

La 14-an de septembro 2013 en Jaroměřice nad Rokytnou en Societo Otokar Březina okazis ĝenerala kunveno de la membraro kaj ankaŭ baptado de nova libro de Otokar Březina **Moje matka – Mia patrino**. La libron preparis Viktor Dvořák el Moravské Budějovice kaj Miroslav Malovec el Brno. Grafika laboro Zdeněk Dvořák. Kunlaboris ankaŭ Jan Werner el Brno.


Kraj Vysočina

The Vysočina Region is rich not only in monuments of the World Historic Heritage UNESCO, but, also in places linked with personalities of the world culture. They include Gustav Mahler, Bohuslav Martinů, František Václav Mlýč, Bohuslav Martinů, Bedřich Smetana, Jan Václav Stamice, writers Bohumil Hrabal, Jaroslav Hašek, Franz Kafka, as well as the economist Josef Alois Schumpeter, creator of the Japanese economic miracle in the second half of the 20th century.

An inquisitive reader will certainly accept the DVD attached to this publication, as an informal invitation for a virtual and later on a real tour around the monuments of the Vysočina Region of the Czech Republic.

L'UNESCO ha dichiarato patrimonio mondiale dell'umanità la Vysočina Regione anche perché si tratta di luogo dove hanno vissuto e operato grandi personalità del mondo della cultura: compositori di musica come Gustav Mahler, Bohuslav Martinů, František Václav Mlýč, Bedřich Smetana, Jan Václav Stamice, scrittori come Bohumil Hrabal, Jaroslav Hašek, Franz Kafka, e l'economista Josef Alois Schumpeter, l'autore del miracolo economico giapponese nella seconda metà del 20° secolo.

Il lettore curioso avrà il DVD che è attaccato ai libri, come un invito a visitare virtualmente le attrazioni della Vysočina Regione nella Rep. Ceca.



Kandidato Nobelovy ceny za literaturu, básník Otokar Březina (1868 – 1929), působil v Kraji Vysočina, převážně v Jaroměřicích nad Rokytnou. Skromnou ukázkou jeho díla je knižní vydání jeho básně "Moje matka – Mia patrino" ve večerajazyčném překladu ke 145. výročí narození básníka v roce 2013. Laskavě čtenáři ještě si vyhlédli překlady jeho dalších básní od překladatelů uvedených na konci knihy.

Kandidato por Nobel-premio pri literaturo, poeto Otokar Březina (1868 – 1929), aktivis en la Vysočina Regiono, plejparte en Jaroměřice nad Rokytnou. Modesta specimeno el lia verkaro estas libroforma eldono de lia poemo "Moje matka – Mia patrino" en plurlingva traduko, okaze de la 145-a datreveno de la naskiĝo de la poeto en 2013. La alfabeta leganto certe mem elseros tradukojn de liaj pliaj poemoj fine de la tradukotaj mencioj fine de la libro.

The candidate for the Nobel Prize in Literature, the poet Otokar Březina (1868-1929) spent most of his life in the Vysočina Region (Kraj Vysočina) particularly in Jaroměřice nad Rokytnou. The book edition of his poem "My Mother-Mia patrino" is a modest sample of his work. It is published in a multi-lingual translation for the 145th anniversary of his birth. A kind reader will certainly look up translations of his other poems by those translators who are listed at the end of this book.

Candidato al Premio Nobel per la Letteratura, il poeta Otokar Březina (1868 – 1929), ha vissuto e lavorato nella Vysočina Regione, soprattutto nella città Jaroměřice nad Rokytnou. Un modesto esempio del suo lavoro è l'edizione del libro delle sue poesie "Mia madre – Mia patrino". Si tratta di una traduzione multilingue in occasione del 145esimo anniversario delle sue poesie di traduttori elencati alla fine del libro.

Kraj Vysočina

Kraj Vysočina je bohatý nejen na Památky světového kulturního dědictví UNESCO, ale i na místa, kde působily osobnosti světové kultury, jmenovitě hudební skladatelé Gustav Mahler, František Václav Mlýč, Bedřich Smetana, Jan Václav Stamice, spisovatelé Bohumil Hrabal, Jaroslav Hašek, Franz Kafka nebo ekonom, tvůrce japonského hospodářského zázraku ve druhé polovině 20. století, Josef Alois Schumpeter.

Zvědavý čtenář ještě přijme DVD které je přílohou knihy, jako neformální pozvání na virtuální i v budoucnu i skutečnou procházku po památkách Kraje Vysočina v České republice.

La Vysočina Regione ricca je Memorioj de la Mondo Hereditajo de UNESCO kaj ankaŭ je lokoj, kie aktivis personoj de la monda kulturo, nome komponistoj Gustav Mahler, Bohuslav Martinů, František Václav Mlýč, Bedřich Smetana, Jan Václav Stamice, verkistoj Bohumil Hrabal, Jaroslav Hašek, Franz Kafka kaj ekonomo, kreinto de la japana ekonomia miraklo de la 20-a jarcento, Josef Alois Schumpeter.

Leganto sopiranta kleriĝi certe akceptos DVD kiu estas almetita al la libro, kiel neformalan inviton por virtuala kaj future ankaŭ reala promeno liaj memorioj de la Vysočina Regiono en Ĉeĥa Respubliko.

OTOKAR BŘEZINA

MOJE MATKA – MIA PATRINO

★ OTOKAR BŘEZINA

La libro prezentas la plej faman poemon de Otokar Březina **Mia patrino**, kiu aperis 1895 en la kolekto **Misteraj malproksimoj**. La poeto estis tiam 27-jara, sed la poemon li verkis pli frue, eble ne longe post la forpaso de la patrino en 1890, kiam li estis 22-jara.

La libro enhavas du ĉefajn versiojn de la poemo (1895 kaj 1933), tri esperantlingvaj tradukojn (S. Schulhof, J. Kořínek, J. Krolupper) kaj tradukojn en la angla, bulgara, franca, germana, hispana hungara, itala, latina, latva, rusa, serba kaj slovaka de profesiaj tradukintoj, kies tradukojn kaj kopirajtan permeson oni sukcesis akiri.

En la libro estas enmetita ankaŭ kompakta disko (DVD) pri virtualaj vizitoj de interesaj lokoj en Regiono Vysočina en la lingvoj ĉeĥa, Esperanto kaj angla. Sponsoris energetika Grupo ČEZ.

Kraj Vysočina





virtuální prohlídky – virtualaj vizitoj – virtual tours







La solenaĵon partoprenis kvar esperantistoj: Inĝ. Viktor Dvořák kun sia edzino Libuše Dvořáková, Inĝ. Margit Turková kaj Miroslav Malovec. La ceteraj personoj estis membroj de la Societo Otokar Březina.

El la muzeo iris ĉiuj unue al la tombejo, kie jam post la tombo de la poeto staris membroj de loka preĝeja ĥoruso. La ceteraj homoj ekstaris antaŭ la tombo. Iomete pluvetis. La ĥoruso per kanto malfermis la solenaĵon, poste oni transdonis la vorton al poeto Jiří Kuběna. Tiu voĉlegis sian tekston, alparolante la poeton en la dua persono, kvazaŭ vivantan estaĵon. Li diris, ke Březina precize plenumis la predikon de Jesuo Kristo sur la monto, ĉar li estis malriĉa, modesta, humila.

Post reveno en la muzeon, ni vizitis korton kun ĝardeneto dediĉita al Karel Čapek (jes, al Čapek, ne al Březina!), Jiří Kuběna almetis novan ŝtonon sur simbola rokaro kun rokaj plantoj. Poste ni sidis en la biblioteko de la domo, kie en la libroŝranko estas ankaŭ manuskriptoj de Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek kun esperantlingvaj tradukoj el Březina (kopiojn ni ricevis jam antaŭ kelkaj jaroj). Ni rakontis pri la estiĝo de la libro, pranepo de amiko de O. Březina klarigis devenon de la ŝtono, kiun Jiří Kuběna metis sur la ĝardeneton de Karel Čapek. Ĉeestis ankaŭ la urbestro de Moravské Budějovice kun sia edzino.

Por tagmanĝo ni foriris al la restoracio Viola, kie poste okazis la ĝenerala kunveno de la Societo kun raporto pri mastrumado kaj pri planoj por la futuro, ekz. pri intenco aranĝi konkursojn por gimnazioj en deklamado de Otokar Březina. Poste oni alvokis Margit Turková, kiu el la libro tralegis esperante tri strofojn en traduko de J. Krolupper.

Tiam jam ĉeestis fama profesia aktorino Gabriela Vránová, kiu deklamis plurajn poemojn de Březina. Sed en la komenco ŝi diris, ke la intenco aranĝi konkursojn de deklamado por gimnazioj ne ŝajnas al ŝi prudenta, ĉar Březina estas nia plej malfacila poeto kaj por kompreni lin necesas longe maturiĝi. Ĝi ne estas poezio por geknaboj. Aŭdante ŝin mi devis konsenti. En ŝia prezento la poemoj impresis tute alie ol se oni mem legas ilin el la libro. Ŝia voĉo donis al la poemoj novan dimension.

Poste Viktor Dvořák kaj Miroslav Malovec tralegis alterne klarigon pri la libro, pri ĝia estiĝo kaj dankon al la sponsoroj.

Kelkaj homoj poste postulis, ke ni subskribu ilian ekzempleron de la libro, kelkaj demandis ankaŭ pri Esperanto, sed nur private ĉe nia tablo.